

# La Movado

Fondita en 1951 N-ro 757 marto 2014

komuna organo de:

KANSAJA LIGO de ESPERANTO-GRUPOJ  
Sone-higasi 1-11-46-204, Toyonaka-si, Ōsaka-hu, 561-0802

KJUŜUA ESPERANTO-LIGO  
Tohurō minami 2-8-7, Dazaihu-si, Hukuoka-ken, 818-0105

ESPERANTO-LIGO de TYŪGOKU kaj SIKOKU  
Oogonzan-tyō 7-15, Minami-ku, Hirosima-si, 734-0041

## ENHAVO

Japanaj eldonadoj en 2013.....	SOMEKAWA Takatosi-2
語尾なし単語の使い方 (15) .....	相川節子 2
楽しい作文教室 (33) .....	塚本猛 3
Kajero libervola: Kiu mortigis Mozart?	
.....	MATUMOTO Midori 4
Raporto pri la 32-a KS .....	ĈE Juna 5
対訳:「先生の顔」(2) .....	竹久夢二/沖恵明 6
『モバード誌』画像閲覧検索プログラム .....	福本博次 7
マラウィのエスペラント学校支援のお願い..	相原美紗子 8
Japanaj Malnovaj Rakontojより (3) 春の野路から .....	9
Salono: 前川治哉 (関西大会でもフレーム切手) .....	10
私と小鳥と鈴と .....	金子みすゞ/野田淳子 11
Vortaro por lernantoj (138) .....	Laŭlum 12
La Movado: 各地のザメンホフ祭、関西大会他 .....	12-14
Enigma .....	Redakcio 14
Mikspoto/ 作文教室成績・課題 /KLEG 事務局だより .....	15
編集ノート .....	16

## Japanaj eldonadoj en 2013

SOMEKAWA Takatosi



bedaŭras tro fruan forpason de la unua redaktinto SHIBATA.

Japana Esperanto-Instituto eldonis memorlibron “Japana Literatura Juvelaro” por honori la Kongreson. Ili alvokis esperantistojn traduki japanajn beletraĵojn. Responde al la varbado pli ol 30 personoj prezentis sian tradukaĵon. La libro enhavas 47 verkojn de 30 aŭtoroj en diversaj epokoj kaj ĝenroj: de la antikva epoko ĝis la moderna; noveloj, poemoj, eseoj ktp.

Japana Esperanta Librokooperativo, eldona fako de KLEG, lanĉis tri librojn. “Kuru, Melos!” estas konata noveleto de verkisto DAZAI Osamu, esperantigita de KONISI Gaku, ilustrita de profesia pentristo

DAZAI Osamu

### Kuru, Melos!



En la lasta oktobro japana esperantistaro solene festis jubilean centan Japanan Esperanto-Kongreson.

Okaze de la Kongreso aperis monumentaj libroj. “Biografia Leksikono de la Esperanto-Movado

en Japanio”, redaktita de SHIBATA Iwao kaj GOTOO Hitosi sub kontrolo de MINE Yosataka, estas granda referenca libro pri agadoj de ĉirkaŭ 2900 forpasintaj esperantistoj kaj subtenantoj. Tiom da multaj homoj simpatiis al Esperanto kaj reale vivis. Tiu ĉi leksikono elokvente montras disvastiĝon kaj eblecon de E-movado en Japanio dum pli ol unu jarcento. Antaŭ tridek jaroj “Biografia Leksikoneto” aperis, sed persista klopodo de la redaktintoj tute renovigis tiun prototipon. Elkore ni esprimas gratulon pro la publikigo post ilia peza redaktado. Samtempe ni sincere

Shuji NISHIDA. Ni povas gustumi rafinitan tradukarton de KONISI en la dua eldono de "Kvar fabeloj de Miyazawa Kenzi". TANI Hiroyuki reviziis oportunan vortaron "Konciza Vortaro Esperanto-Japana" okaze de la dua preso. Ĝi praktike taŭgas por ĉiutaga uzado de Esperanto. En la jaro 2012 ĝi aperis kaj estis represita nur unu jaron poste.

Tradukita bildlibro reeldonita, "Fajro de Rizstako -La rakonto pri Gorjo HAMAGUCHI" estas paralele verkita en tri lingvoj: la japana, la angla kaj Esperanto. Ĝi estas frukto de kunlaborado de EGAWA Harukuni kun aliaj kultur-grupoj: Wakayama Bildlibra Asocio, grupo de la angla lingvo. Nia memoro pri la granda tertremo kaj cunamo en la nordorienta Japanio ankoraŭ nun estas freŝa, kaj do ĉi-foja reeldono estas konvena.

HORI Jasuo eldonis la 16-an volumon de "Raportoj el Japanio" kaj esearon "Sekaino tabibito Hori-san no esuperanto kimama essee 3". La unua havas subtitolon "Katastrofo de Japanio en la dua jaro". Li senlace daŭrigas sendi al la mondo siajn raportojn, kiuj temas pri reala nuntempa Japanio surbaze de popola vidpunkto.

"Esperanto per ekzercaro por japanlingvaj komencantoj" de JEI estas nova lernilo por memlernantoj. Por plimultigi esperantistojn ni bezonas diversajn praktikajn lernilojn. La japana sekcio de ILEI japanigis broŝuron "Malkovru Esperanton". "Esperantaj sinonimoj por japanlingvanoj ampleksigita reeldono" de SAKA Tadasu estas tre utila por riĉigi nian esprimpovon.

FUKUMOTO Hirotsugu faris DVD-version de "Vortaro Japana-Esperanta". Oni facile povas trovi celitan paĝon per programo tenata en la disko. Ĉar nuntempe multaj homoj uzas komputilon, ĝi bone respondas al nia bezono. "Vortaro Japana-Esperanta" naskis alian eldonaĵon. Sanmoku-kai kolektadis specifajn frazojn el la vortaro kaj eldonis libreton "Zisyo 2014.3

kara hirota omosiro hyôgen".

Jamagata Esperanto-Klubo produktis KD-n "Tagiĝo". Operkantisto FUJINO Youichi brilante baritonvoĉe kantis famajn kantojn: "La Tagiĝo", "Vin Kantflugile, Kara" ktp.

Rikoltaĵo sur eldona kampo en la jaro 2013 estis tiel riĉa, ke tiuj eldonaĵoj ĉiam atendas de vi bonan legadon!

初心者のための

語尾なし単語の使い方 (15)

相川節子

本来副詞 (24) **nun**

「今、この時点で」または「今の時期に」を意味する副詞です。文章全体を修飾することが多いので、語順は比較的自由です。

"Ĉu vi jam donis matenmanĝon al la kato?"

"Jes, ĝi nun manĝas."

(「猫に朝ご飯をやった?」「うん、今食べているよ」)

"En la lasta jaro mi ekŝiĝis de la laboro kaj nun mi estas pensiulo."

(昨年退職して、今は年金生活者です)

本来副詞 (25) **nur**

「～だけ」「たったの～」という意味の副詞です。数量や程度が少ないことを強調するために使われます。対象の単語の直前に置きます。

nur は日常会話や通信でひんぱんに登場する単語なので、エスペラントを普通に読み書きしていると必ず出会います。逆に言うと、nur を耳慣れた単語だと感じるなら、エスペラントの読み書きにかなり慣れてきた証拠です。

En mia familio nur mi estas esperantisto.

(家族の中で、私だけがエスペランティストです)

Li ne havas doman telefonon. Nur poŝtelefonon li uzas.

(彼は固定電話を持っていない。携帯電話だけを使っている)

En la vilaĝo loĝas nur kvin familioj.

(その村には5世帯しか住んでいない)

Zamenhof estis nur 19-jara, kiam li kreis sian novan lingvon.

(自分の言語を作り出した時、ザメンホフはたったの19歳だった)

[この項続く]



①彼らはしばしば昼食を外食する。

【訳例 1】 Ili ofte tagmanĝas restoracie.(CA, Fumi)

【訳例 2】 Ili ofte tagmanĝas en restoracio.(Eiko, Ĉielo, Lv-rivero, Yo, alfa)

【訳例 3】 Ili ofte prenas tagmanĝon eksterhejme. (M.H.)

昼食をとる：tagmanĝi.

飲食店：restoracio.

tagmanĝi (昼食をとる) は問題ないと思いますが、manĝi restoracie (外食する) は少し厄介だったようです。restoracio は日本語のレストランより広い意味で使い、ファースト (ファスト) フード店も含まれます。この課題の「外食する」は、「家庭外の食堂などで食事をする」という意図でした。そのように解釈した訳例 1、訳例 2 では飲食店で昼食をとると明示しています。訳例 3 は「家庭外で」と表現しています。「昼は外で食べる」の方が普通の言い方でしょうが、その場合、弁当などを公園で食べるという風に解釈することもできます。「外食」についての辞書の記述も様々で、必ずしも飲食店や食堂に言及しているわけではありません。他人の家で食べる場合を考慮すると訳例 3 の方が良いかもしれませんね。

訳例 3 の preni は「取る、利用する、持つていく」など、幅広く使える動詞です。パンやスープは manĝi、コーヒーは trinki、薬は preni ですが、preni はパンやコーヒーにも使うことができます。

②彼はファーストフードを食べている。

【訳例 1】 Li manĝas rapidmanĝaĵon.(Drako, Eiko, Ĉielo, AG, ヒー坊, ikona, Yo, Fumi, Ivajo)

【訳例 2】 Li nun prenas rapidmanĝaĵon.(M.H.)

【訳例 3】 Li nun gustumas rapidmanĝaĵon. (Dalpengji)

ファーストフード：rapidmanĝaĵo.

たぶんハンバーガー (hamburgero) などを食べているのでしょうか。私も良く食べますが、ファーストフードは英語の fast (速い) food (食品) のカタカナ語です。エスペラントの fasti は「断食する」という意味なので使えませんが、音の似てい

る hasti (急ぐ) なら hastmanĝaĵo ができます。訳例 3 では「味わって」いますが、そんなものは fastmanĝaĵo、断食するのと同じような、食事といえないような代物だとの酷評もあるようです。

③彼女はよく喫茶店に行く。

【訳例 1】 Ŝi kutimas viziti kafejon.(Drako, Eiko, ヒー坊, ikona, CA, Lv-rivero, Fumi, Ivajo)

【訳例 2】 Ŝi ofte vizitas kafejon.(M.H.)

【訳例 3】 Ŝi kutimas iri al kafejo.(Yo)

喫茶店：kafejo.

訳例 1 のように、「よく～する」には kutimi (習慣がある) を使うことができます。その行動をしばしば繰り返すため、習慣になっていると考えられる場合です。でも kutimiĝi だと「習慣を身につける」の意味なので、題意とは違って「喫茶店に行くのに慣れている」の意味になると思います。訳例 2 は、喫茶店に行くのが毎日の決まり事になっているのではなくても、別の事情で何回も行ったたり、1日の内に何度も行くような場合に使えるでしょう。

「行く」は訳例のように viziti や iri でしょう。veni (来る) も考えられますが、この課題では、話者の視点が喫茶店に無いので使えません。

④その喫茶店はファーストフード店の近くにある。

【訳例 1】 La kafejo troviĝas proksime de la rapidmanĝaĵejo.(Dalpengji)

【訳例 2】 La kafejo estas proksime al la restoracio de rapidmanĝaĵo.(Drako)

【訳例 3】 La kafejo situas najbare de la rapidmanĝejo.(ikona)

【訳例 4】 La kafejo troviĝas apud la rapidmanĝejo.(Eiko)

ファーストフード店：rapidmanĝejo.

restoracio de rapidmanĝaĵoj のような表現もありましたが、単純に rapidmanĝejo で良いと思います。「～の近くに」は訳例のように proksime de や najbare de、apud を使うことができます。ĉirkaŭ を使う解答もありましたが、これは「周囲、周辺」の意味です。「おおよその位置」の意味で使うこともありますが、この場合は無理があると思います。「ある」については訳例のように troviĝi、situi, esti などを使えます。

成績、5月号の課題は p.15.

要約：映画「アマデウス」で有名になった音楽家モーツァルトの死の謎。研究者の間では毒殺説で見解が一致しています。一体誰が天才を殺害したのでしょうか？

La mondfama filmo “Amadeus” estis produktita en Usono en 1984 kaj prezentita en Japanio en 1985. La filmo rakontas, ke la itala komponisto *Salieri* konfesis al pastro, ke li mortigis *Mozart* pro sia ĵaluzo pri lia genia talento.

*Mozart* naskiĝis en la urbo *Salzburg* en Aŭstrio en 1756. Li komencis ludi klavicenon en sia 3-a jaro kaj jam en sia 5-a jaro li faris komponaĵon. Dum li vojaĝis kun sia patro tra Eŭropo por okazigi koncerton, li famiĝis pro sia genio. Li fariĝis la muzikisto al la ĉefepiskopa kortego en 1769, sed sendependiĝis en 1781. Tiutempe muzikistoj ĝenerale estis dungataj de la reĝo kaj eklezio. Post la sendependiĝo estis malfacile al *Mozart* vivteni sin. Li prunteprenis grandan sumon da mono de siaj riĉaj amikoj kaj subtenantoj. En sia 35-a jaro li finis sian mallongan vivon, postlasinte al ni misterojn.

Kiajn misterojn li postlasis al ni? Unue, la kaŭzo de lia morto tute ne estas klara. Ni povas konjekti, ke iu volas kaŝi la kaŭzon de lia morto. Due, lia kadavro estis enterigita en senfama komuna tombejo. Post nelonge la pozicio de lia tombo iĝis nekonfirmebla. Estas strange, ke oni ne okazigis grandiozan funebran ceremonion okaze de la entombigo de tiom fama muzikisto. Krome, nur kelkaj konatoj tiam ĉeestis ĝin. Multaj historiistoj konsentas al la opinio, ke li estis venenita, sed ili diversmaniere opinias, kiu mortigis lin.

Pri tio estas tri jenaj influhavaj opinioj. Laŭ ies opinio, *Salieri* estis la kulpulo. Tiu opinio originas el la teatraĵo “Mozart kaj *Salieri*” farita de rusa verkisto *Puŝikin* en 1830. En ĝi *Salieri* invitas *Mozart* al restoracio kaj metas venenon

en lian manĝaĵon. Tiu sceno de la teatraĵo naskis tian komprenon.

Laŭ alia opinio, Framasonismo sendis al li murdistojn. Framasonismo estas tutmonda kaj malnova organizo, kiu uzas sekretajn ritojn ekde kiam ĝi estis mezepoka masonista gildo. Ĝi ĝenerale kunvenas por plibonigi toleremon, moralecon, fratecon, liberecon kaj egalecon en la socio, kaj havas 33 klasojn. Kiam oni avancas, oni ekscias pli da sekretoj apartenantaj al la supera klaso. Tiam oni estis devigita ĵuri, ke oni ne malkaŝos la ricevitajn sekretojn al aliaj homoj. *Mozart* fariĝis ties membro en 1784 kaj fervore aktivis por la organizo en siaj lastaj jaroj. Li do havis multajn konatojn en Framasonismo. Ankaŭ la barono *Swieten* estis membro kaj li regis la funebran ceremonion por *Mozart*. Unu el la membroj, *Schikaneder*, administranto de teatraĵo, verkis tekston por la muzikaĵo “La Magia Fluto” kaj petis la muzikiston komponi laŭ lia teksto en 1791. *Mozart* volonte akceptis tiun peton. Sed li malkaŝis ricevitajn sekretojn pri la ritoj en la komponaĵo. Li, ekzemple, ripetis “tri” akordojn “trifoj” post paŭzo meze de la uverturo de tiu muzikaĵo. Tio facile rememorigas al framasonoj, ke la membroj frapas pordon “trifoj” okaze de la ritoj. Vidinte, ke li malkovris la sekretojn, Framasonismo ordonis al du membroj—*Swieten* kaj *Schikaneder*—mortigi lin.

Laŭ ankoraŭ alia opinio, li mortis pro iom-post-ioma prenado de hidrargo. Multaj homoj kredas, ke li estis mortigita de proksimulo, ĉar estas ebleco, ke li suferis ren-perturbon pro hidrargo, kiu havas malrapidan efikon. Kiu estus povinta mortigi lin tiel? Ŝajne nur lia edzino *Constanze*. Eblas argumenti, ke ŝi ĉiutage intence prenis al sia edzo hidrargon. Ŝi nek ĉeestis lian funebran ceremonion, nek konstruis lian tombon. Ŝi forĵetis leterojn de sia edzo, kiuj estis malfavoraj por ŝi. Certas, ke ŝi sciis ion pri la morto de *Mozart* kaj klopodis kaŝi ĝin. Kiu laŭ vi estas la vera kulpulo?

## Raporto pri la 32-a KS

Ĉe Juna

Post la 31-a KS, kiu okazis en Tokio, jam pasis unu jaro. Laŭ la vico ĉi-foje la 32-a KS okazis en Pekino en Ĉinio de la 20a ĝis la 22a de decembro 2013.

Mi partoprenis en ĝi por la tria fojo. Mi jam spertis la junularan kunvivadon unuafoje en Koreio, duafoje en Japanio, nome mi povis resti en tri landoj ĝis nun pere de KS.

En la KS 62 homoj el 7 landoj partoprenis kaj pli detale 12 homoj el Japanio, inkluzive min, 5 homoj el Koreio. Tie estis ne nur junuloj, sed ankaŭ eksjunuloj.

Kiam mi alvenis al la seminariejo, mi ĝojis pri la partoprenantoj. Ĉar el ili miaj konataj vizaĝoj estis sufiĉe multaj. Mi jam renkontis ilin en la antaŭa KS. Do, ŝajnis al mi, ke la 31-a KS plaĉis al ili. Tio estis ĝojega afero por mi, kiu estis unu el LKK de la 31-a KS.

Ĉi-foje pro mia laboro mi partoprenis de la dua tago posttagmeze kaj tiam junuloj raportis pri la situacio de la junulara movado en diversaj landoj. Tiutempe raporto el Japanio temis pri JEK100 kaj JEJ.

Post la programero okazis prezentado de TEJO kaj aktivula trejnado kaj samtempe okazis kurso de Esperanto por komencantoj. Laste en arta vespero la partoprenantoj kantis kaj dancis. En la tago nokte mi promenis eksteren kun kelkaj junuloj elmetante sin en



pekina vintra aero kaj manĝis ĉinan pikan manĝaĵon.

En la tria tago ni iris al pekina internacia instituto por profesia trejnado kaj kuiris ĉinan manĝaĵon helpe de ties studentoj. Post la kuirado ni vizitis ekspozicion de kaligrafiaĵoj de *Zhou Wenzhang* kaj finiĝis KS. Multaj partoprenantoj revenis al siaj hejmoj kaj komenciĝis postseminariaj ekskursoj por restaj liberuloj. Ni vizitis la Someran Palacon, kie troviĝas vasta artefarita lago. Transiri sur glaciĝinta lago estis amuze por mi. Duonvoje la lago iom ekkrevetis kaj la amuzo duobligis.

Tiunokte mi denove promenis eksteren kun aliaj junuloj kaj ni trinkis kaj manĝis en junulara hotelo, kie iom da ĉinaj junulinoj loĝis dum KS. Tiam iu junulo diris, ke danke al Esperanto ni nun kune estas ĉi tie. Jes, tio estas vere belega afero. Sed bedaŭrinde nia komuna lingvo estis la angla lingvo, ĉar ties duonaj ĉeestantoj estis ankoraŭ komencantoj, kiuj bone parolas la anglan lingvon. Sed ili klopodis komunikiĝi kun aliaj, kaj tio estis por mi tre impresa.

Restaj partoprenantoj daŭrigis ankoraŭ du tagojn por la ekskursoj, kvankam mi ne povis partopreni en ĝi. KS valoras ankaŭ por sciigi kaj ĝuigi la lokon. La venonta vico estas por Vjetnamio, kie aktivus multaj junuloj. Mi antaŭgigas kaj scivolos, kiel ili preparos ĝin jam fininte IJK antaŭ 2 jaroj.

## 先生の顔

(2)

竹久 夢二

2

つぎの日、葉子はすこし早めに家を出て、森先生のいつも通っていらっしゃる橋の上で先生を待っていた。やがて先生は、光子(みつこ)という同級の生徒と連れだって歩いていらした。葉子は丁寧に辞儀をした。先生は何事もなかった前のように、にこやかに「おはよう」を仰有った。それで葉子は、ほっと安心した。そしてうれしさに忙しくて、悪い気ではなく光子に「おはよう」を言うのを忘れていた。



desegnis GOTO Miwa

「葉子さんおはよう！」光子はわざと意地悪く葉子の前へ突立(つた)って辞儀をした。そして「葉子さん、今日は廻り道をしていらしたのね」と光子は科(とが)めるように言った。

葉子は日頃から意地の悪い光子が好きでなかった。

「ええ」と葉子はおとなしく答えた。

森先生は、葉子のリボンをなおしてやりながら、「葉子さんのお宅(うち)は山の方でしたねえ。お宅の近所の野原には沢山に草花が咲いていてどんなにか好(い)いでしょうね」

「先生はあんな田舎(いなか)の方が好きですか」

「ええ、毎日でもゆきたいと思いますわ」

「先生、私の宅へいつかいらっしゃいな。そりゃあ綺麗(きれい)な花があるの。だって、葉子さんのお宅の庭よかずっと広いんですもの」

光子が勢(いきおい)こんで言ったけれど、誰(だれ)もそれには答えなかった。(続く)

## Vizaĝo de la instruistino

(2)

de TAKEHISA Yumezi  
tradukis: OKI Keimei

2

En la sekvanta tago, *Yôko* iom frue eliris el sia domo kaj la instruistino *Mori* atendis ŝi sur la ponto, tra kiu la instruistino ĉiam iras al la lernejo. La instruistino baldaŭ paŝante venis kun *Mituko*(Micko), samklasano de *Yôko*. *Yôko* ĝentile klinis la kapon al la instruistino. Kiel antaŭe, kiam nenio okazis inter la instruistino kaj *Yôko*, la instruistino ridete diris: “Bonan matenon!” Tio donis al *Yôko* trankvilecon. Kaj ŝi ne diris “bonan matenon” al *Mituko* sed sen intenco kaŭzi malicon kontraŭ *Mituko*. *Yôko* simple forgesis diri la vortojn al *Mituko* pro la okupiteco senti ĝojon.

“Bonan matenon, *Yôko*!” Kun malica intenco *Mituko* starigis antaŭ *Yôko* kaj klinis sian kapon al ŝi. “*Yôko*, hodiaŭ vi ne rekte celis la lernejon, ĉu jes?” ŝi diris kun riproĉa paroltono.

*Yôko* ne ŝatis ŝin ĉiam kun malica koro.

“Ne,” ŝi respondis kun obeema mieno.

La instruistino, ĝustigante rubandon de *Yôko*, diris:

“*Yôko*, via domo estas proksima al monto, ĉu ne? Kiel bona estas via loko! Ĉar floras multe en la herbejo apud via domo.”

“Ĉu vi preferas tian kamparon?”

“Jes. Mi deziras viziti tiun lokon eĉ ĉiutage.”

“Instruisto, bonvole iam venu al mia domo. Belaj floroj troviĝas. Ĉar nia ĝardeno estas multe pli vasta ol la ŝia.”

*Mituko* energie diris, sed neniu respondis al ŝi. (daŭrigota)

エスペラントと平和の条件

1100 円

寺島俊穂著。「グローバル化と言語民主主義」など地球時代のエスペラントの可能性を説く論考集。

2014.3

エスペラントとグローバル化

900 円

タニヒロユキ著。「国際と民際」「国際英語主義とグローバル化」など民際語とはなにかを考える。

— 6 —

La Movado 757

## 『モバード誌』 画像閲覧検索プログラム

福本博次 (和歌山県)

このたび、標記のDVDを販売することになったので、その概略と開発経過について、日本語エスペラント辞典(DVD)のところで書いた内容と重複するところもありますが、まとめました。創刊号から2013年12月の754号まで、延べ769号のモバード誌(前身の「関西エスペランチスト」等も含めて)の、全部で12493ページの画像が、年月とページ、または検索文字で一瞬で見つけて読む事が出来ます。古い号のページは読みにくい所がありますが、何か調べたい時やさかのぼって記事を読みたい時には、とても便利です。また、タブレットに入れておけば、何時でも見る事ができます。(使い方)


西暦の年月6桁を入れると、またはここで3桁の号数を入れて『Enter』キーを押すと、該当のモバード誌の目次画像が出るとともに、より詳しい目次データの一覧が出る。各ボタンで、前号、又は次号に移動したり、表示するページを変えられる。

また、ページの画像が出ている時に、ページ画像の左端又は右端の部分(このとき、マウスのカーソルの形が変わる)でマウスを左クリックしても前・次ページに移動できる。

ページ画像や、目次一覧の文字の大きさを変えたりなど、その他の機能もある。また、ほんの一部だが、ワープロで復元作成したPDFを見ることができる。

検索したい文字や筆者名等を入れて、検索ボタンを押すと、関連記事の一覧が出るので、その記事をクリックして、ページを読むことができる。(スキャン作業とプログラム開発の経過等)

2012年の初め頃から、手許に残っていたモバード誌バックナンバーを廃棄したいと思い、それらをスキャンデータの形で残す事にした。その後、単なるPDFでは、個別の号を読むだけなら問題ないが、10年以上もの(2000ページを超える)モバード誌を見るの



検索して、その中から記事を指定して表示した時の画面の例

には適していない事がよく分かってきた。このため目次をデータ化して検索し、見つけたページを表示するプログラムを2012年の春に作成した。

その後、KLEGでもバックナンバーのスキャンを企画した事があるということを知ったので、その作業を試みようと思い始めて、KLEG事務所に残っている予備のモバード誌を確認したところ、1970年から後の号は大体あることが分かった。そこで、これらのスキャンを始め、欠けている号や1970年より前のものを中道さんより借りてスキャンを続けた。中道さんのところに残っていたのは1964年以降のものだったので、その後坂本昭二さんが残してくれていたものを使って、欠けていた創刊号からのものをスキャンすることができた。また、モバード誌の前身ともいえる「大阪エスペランチスト」や「関西エスペランチスト」(通算8号6冊)も加えることができた。更にKLEG事務所に保存されている製本されたモバード誌の最初に閉じられている「エスペラント通信」(7号)。これはここから直接スキャンしたので、綴じ代の部分が読み取れなかった。

この間、スキャンのやりかたを手直ししたり、関西大会の準備や、宮本正男編集の日本語エスペラント辞典のDVD作成などもあり遅れに遅れてしまった。更に、古いモバード誌は年月経過での変色・劣化、また1966年以前のは謄写印刷の悪さもあり、画像を少しきれいにするのにかなりの時間もかかった。しかし、スキャン画像で読めないところや汚いページがまだたくさん残っている。1ページ直すのに数時間もかかるページもあり充分直せず、周辺部分をきれいにしただけで諦めたページも多い。

プログラムの方は、最初に私がDelphiというプログラム言語で開発したが、これを御坊市の寺本敏高さんに見てもらったところ、JavaScriptを使ったホームページとしてのプログラムを作成してくれた。これなら、Windowsだけでなく、マックのパソコンやアンドロイドタブレットでも使うことができる。このプログラムは2012年の暮れには基本的にできていたが、辞書のプログラムを仕上げる段階での改良点を取り入れて、一部改良した。今後の改良については、使用上で不都合があれば修正していくつもりだ。

最後に、このプログラムを少し改変して、各地方会の機関誌のバックナンバーについて、スキャン画像を作成し、記事の一覧を作成すれば、同様に活用できるので、ご希望があれば、プログラムの改変については協力するのでご連絡ください。

KLEGで販売中 売価 6800円 (KLEG会員、当該購読者は5000円)

## アフリカ、マラウィの Dzaleka 難民キャンプの

### エスペラント学校支援のお願い

相原美紗子 (千葉県)

昨年夏に、アフリカのマラウィにある Dzaleka 難民キャンプに住む37歳のエスペランチスト Christine Mubazumutima さんからメールをもらいました。彼女からの手紙にあるように、過酷な環境でエスペラントにめぐり合い学んでいる子どもたちを支援できたらと思い、エスペランチストの皆さんに、協力を呼びかけることにしました。

添付の写真は、Dzaleka Camp の様子。横長の建物(手前の)が、学校です。

アフリカ大陸の南東部、タンザニアの真南にある国マラウィにある Dzaleka Camp は1994年に国連難民高等弁務官事務所が創設し、ブルンジ、ルワンダ、コンゴ共和国、ソマリアなどからの難民が暮らしています。



#### Letero al Japanaj esp-istoj de Christine Mbazumutima:

Karaj gesamideanoj,

Mi nomiĝas *Christine Mbazumutima*. Mi estas instruistino de Esperanto en la rifuĝejo-kampo en Malavio.

Mi fuĝis de milito el mia lando DR Kongo. Mia patro estis instruisto por *Honger* unuagrada lernejo. Li rifuzis kontribui al grupo de ribelistoj de *Mai-mai*, do li estis mortigita de ili! Ili perfortis min kaj mian patriron. Feliĉe ŝi mortis! Mi suferis pro la malsano de sekso kiun ili donis sur min. Mi estis helpita de katolika pastro en *Kavinvoira*. Li sendis min al hospitalo kaj poste li helpis min por ke mi

2014.3



alvenu al *Dzaleka Azilo* en Malavio.

Mi loĝas en Malavio nun 11 jarojn sen laboro kaj okupo. Mi provis lerni Esperanton, sed nia instruisto mortis. La klubo estis fermata dum 4 jaroj. Do baldaŭ, mi decidis krei klubon, kie ni havas 73 gelernantojn. Inter ili estas 21 georfoj kiuj perdis siajn gepatrojn de aidoso, sed ili ne havas helpon. Mi penas instrui al ili Esperanton.

Ni suferis instrui ekstere, ĉar pluvo tre ĝenis nin. Ni ĉiuj decidis fabriki brikojn kaj konstrui nian propran lernejon! Ni finis tion sed ni havas mankon de tegmento. Ni ne havas eblecon havi tegmenton! Ni bezonas kursmaterialojn, benkojn, grandan nigran tabulon, 6 fenestrojn kaj du pordojn.

Bonvolu kontribui al nia lernejo.

#### 支援して下さる方へ

\*学校の建物のための資金援助

予算額: 計 268,000 MK (約 69,000 円)

目標額: 7~8万円

郵貯振替口座 00190-7-413766 アイハラムサコ

\*エスペラント図書、教材の寄付

送付先: Christine Mbazumutima

(Dzaleka Esp-Klubo) c/o Justin Peter

PO BOX 30726 Lilongwe/ Malavio (Malawi)

---

1月16日、雨期で雨漏りがひどいので、屋根分として急遽 30,000 円+送金手数料 1,500 円 = 31,500 円を送り、現地では屋根材を買い、設置の準備中です。  
[編集部注] DR Kongo は「コンゴ民主共和国」。Mai-mai は同国の民兵組織。



## Sur vojo de printempa kampo

(春の野路から)

Antaŭ longa, longa tempo ie loĝis malriĉa maljunulo. Li laboris ĉiutage kaj povis apenaŭ vivi.

"Hodiaŭ estas la Budhonasko, do mi ripozu almenaŭ en ĉi-tago en la domo," dum li pensis tiel, refoje okazis nova afero ke li devis iri eksteren. Li havis ĉe sia mano botelon kun ŝoo da sakeo, kiun li speciale jam aĉetis, kaj ekiris sola kun penso ke ie sur vojo li trinku ĝin.

Estis serena kaj bela vetero, kaj oni vidis ke sur kampoj kaj sur montoj disfloris fiere diverskoloraj floroj. Kiam li venis ĝis vasta kampo, la vetero estis tiel bona kaj li estis tiel laca, ke li ekvolis trinki sakeon tie kaj eksidis sur elektita ŝtono; jen, li trovis, kuŝas skeleto ĉe liaj piedoj.

"Ho, saluton, sinjoro! Mi ne povas scii, kies osto vi estas, sed ĉiuokaze bonvena! Mi ne ŝatas trinki sola. Do, ankaŭ vi trinku iom kaj distriĝu kune kun mi antaŭ ĉi tiu pejzaĝo," tiel li diris kaj verŝis sur la skeleton la sakeon metitan en la pokalo ĝis la rando, tiel mi aŭdis. Kaj li eĉ amuze kantetis, kaj post iom da ripozo, li levis sin kaj ekiris de tie.

Dume, kiam li finis sian aferon kaj volis hejmeniri sur la sama kampo en la krepusko de tiu tago, al lia dorso venis voĉo: "Hej, sinjoro Maljunulo, atendu momenton!"

Li sin turnis posten kaj trovis, oni diras, belan fraŭlinon de floraĝo, 17- aŭ 18-jara.

"Hodiaŭ mi havis grandan ĝojon dank' al via komplezo. Mi atendis vian revenon, ĉar mi volas danki vin. Mi estas knabino, kiu mortis atakite de akuta malsano dum vojaĝo sur tiu kampo, en la 28a de ĉi-monato antaŭ tri jaroj. Miaj gepatroj eĉ nun serĉas min ĉie, sed tamen

*La Movado 757*



Desegnita de KITA Satori

pro nia nebona karmo ili ankoraŭ ne sukcesis trovi min, kaj mi restas en senhelpa stato ĝis hieraŭ. En la 28a, mia funebra tago, mi petas, vi nepre venu ĉi tien spite ĉiujn aferojn kaj iru al la domo de miaj gepatroj kune kun mi!" Ŝi diris tiel, oni diras.

Fine venis la 28a tago. Laŭ la promeso li venis al la kampo jam en la mateno kaj trovis ke la bela knabino staras tie kaj lin atendis. Kaj ili kune enpaŝis vilaĝon najbaran de la kampo.

La domo de la knabino estis vera palaco kun impona aspekto, kaj multe da vilaĝanoj kunvenis en ĝi por funebri ŝian mortotagon.

"Mi neniel kuraĝas eniri en tiun," diris la maljunulo. "Se tiel — ŝi diris — vi povas eniri kroĉita al mia vesto," kaj ambaŭ tre facile kvazaŭ glite eniris en la domon rimarkite de neniu kaj sidigis sin en la ĉambro de la budhoaltaro.

En la ĉambro staris regulaj tabletoj, al kiuj

supo kaj sakeo ne mankis. Ĉar certe por li ne malŝataĵo, laŭ la servo de la knabino, li kaj trinkis sakeon kaj manĝis diversajn frandaĵojn laŭ sia gusto. “Ĉu ne strange? Mirige, ĉu ne strange?” Sinjoroj bonzoj kaj gastoj el la parencaro, kiuj sidis en la ĉambro, mirparolis inter si, ĉar la manĝaĵoj kaj sakeo malaperadis de sur iliaj tabletoj, dum ili ne sciis kiam.

Dume kiam venis la tempo forporti la tabletojn, unu juna servistino lasis fali teleron kaj difektis ĝin. La mastro riproĉis ŝin forte: “Granda domaĝo! Ĝi estas trezoro de mia domo.”

La knabino-fantomo ĉe la sceno flustris al li: “Ĉar mi ne ŝatas rigardi tian scenon, nun mi volas foriri.”

Li diris: “Do, ankaŭ mi foriru.” Sed ŝi petis ke li restu tie tute senĝene, kaj ŝi sola foriris ien.

Kiam ŝi eliris, la figuro de la maljunulo tuj komencis malkaŝi sin antaŭ ĉiu. Oni demandis al li:

“Kiu vi estas?”

“De kie vi venis?”

“Kial vi venis ĉi tien kaj ĉeestas en tiu kunveno?”

Ĉar jam nenio povis esti kaŝita, li rakontis detale al ili ĉion, kio ĝis nun okazis; la tuta parencaro estis surprizita kaj mastroj-gepatroj eklamentis. “Do bonvole gvidu nin al la kampo, kie kuŝas mia filino, mi petas, eĉ preĝas al vi!” Ili diris tiel.

Kaj ili iris kun li antaŭe, kune kun tuta parencaro kaj eĉ sinjoroj bonzoj de la templo, prenis al si la skeleton, kaj ili ankoraŭfoje faris solenan funebtron.

Oni diras, ankaŭ la maljunulo forlasis sian mizeran tagmetion kaj favorate de la familio vivis tre komforte sian tutan vivon.

(Takehana tosikazu)

☆ Budhonasko: t.e. la 8-a de aprilo.



## 第 62 回関西大会でも

### フレーム切手を作ります

前川治哉 (兵庫県)

大会のシンボルマークに「しろまるひめ」が使われ、はりまエスペラント会のみなさんの総

意で、大会の記念スタンプの図案とともに切手にも使いたいとのことです。わたしとしては、切手には「姫路城の天守閣を」と思っていたので、とにかく試作品をということで、山田義さんのご協力で、両方の図案で作ってみました。試作品は現行のはがき用の 50 円切手と手紙用の 80 円切手ですが、4 月 1 日から郵便料金が、はがき 52 円、手紙 82 円に改定されるので、正式につくるときにはこの通りになります。

なお、大会会場では、上記フレーム切手や記念封筒とはがきを販売するほか、姫路郵便局が出張して、記念スタンプの押印と郵便物やゆうパックの引き受けをすることになっています。



Salono の原稿を募集しています。半ページ(23 文字×40 行)までで、経験談やご意見などをご投稿ください。これも写真添付は歓迎です。

# 私と小鳥と鈴と

## Mi, birdeto kaj tintilo

poez. Kaneko Misuzu  
muz. Noda Junko  
trad. Simatani Takesi



Ki-el bir-det' mi en a-er' flu-gus al-ten sen çag-ren!  
Dol-ça so-nor' ve-nas al mi de tin-ti-lo en tre-mad'.  
5 Çar ne por mi es-tas flu-gil', res-tas mi sur ter!  
Eç se mi min svin-gus, al mi man-kus be-la son'.  
9 Sed bir-det' ta-men en ver' po-vas mar-çi nur kun çen'.  
Sed tin-til' ta-men en ver' kan-tas so-le per tin-tad'.  
13 For-ta pi-ed' man-kas kaj çgi flu-gas en a-er!  
ko-nas mi ja mul-te da kant' en va-ri-a ton!  
17 Dum tin-til', bir-de-to kaj mi ne si-mi-las in-ter ni,  
21 çi-u el ni kun di-fe-renc' bo-nas en e-senc'!

私と小鳥と鈴と  
金子みすゞ

私が両手を広げても、  
お空はちっとも飛べないが、  
飛べる小鳥は私のように、  
地面（じべた）を速くは走れない。

私がからだをゆすっても、  
きれいな音は出ないけど、  
あの鳴る鈴は私のように、  
たくさんの歌は知らないよ。

鈴と、小鳥と、それから私、  
みんなちがって、みんないい。

**septembro:** La naŭa monato de la jaro.

*Septembro, la monato naŭa  
Por la turismo hodiaŭa  
Agrablas pleje en Pekino,  
Kun belaj lokoj la ĉirkaŭaj.*

**serĉi:** Rigardi, aŭskulti, klopodi por ekscii, kie estas iu aŭ io.

*Johan' ricevis vento-frapon,  
Kiu forportis lian ĉapon.  
Li serĉis kaj ĝin tuj retrovis  
Kaj ĝin remetis sur la kapon.*

**serioza:** Konsiderinda, grava.

*Ŝercema estas la sinjoro,  
Sed pikas lin l' edzina ploro,  
Pro malsaniĝo serioza.  
Doloras al li lia koro.*

**serpento:** Senpieda rampulo kun longa cilindro-forma korpo kovrita de skvamoj.

*Serpento estas besto sen piedoj,  
Facile ĝi trarampas tra fendetoj.  
Por kapti ranon, muson aŭ paseron  
Ĝi ofte sturmsurprizas per sinĵetoj.*

**servi:** 1 Regule labori por iu kontraŭ pago.  
2 Sindediĉe helpi.

*Soldato servas al ĉevalo;  
Ĉevalo al la generalo;  
Kaj la generalo servas  
Al milito per batalo.*

**sezono:** 1 Kvarono de jaro. 2 Parto de la jaro kun karakterizaj klimatoj: La seka, la pluva sezono. 3 Jarparto, aparte taŭga por ia aktivado: la sezono de rikoltado.

*Printempo estas la sezono  
En kiu ŝvelas la burĝonoj.  
Somero estas tempo varma,  
En kiu belas floroj ĉarmaj.  
Aŭtuno estas fruktoriĉa,  
Kaj vintro estas temp' frostiĝa.*

各地のザメンホフ祭 (前々号・前号への追加)

(以下、E = エスペラント)  
和歌山市



和歌山緑丘会の主催で12月7日、例会場のサロン「会」で行われた。参加者は7人。江川治邦さんがフィンランドのErkki Rontynen編集の"Proverbaro-Nia Komuna Heredaĵo"から抜粋した世界の諺(コピー)を配って、世界の文化の顕著性と普遍性について解説し、エスペラントの持つ「国際文化」や「平和の文化」について話した。持ち寄った品を福引きの景品にして楽しみ、記念写真を撮った。その後、レストランに移動して忘年会。これまでになかった雰囲気、第61回関西大会を共に乗り切った安堵もあり、歳を重ねた会員には懇親を味わえる好縁(こうえん)会であった。

[←福本博次、江川治邦]

神戸市



神戸E会、はりまE会合同で12月8日神戸市青少年会館で行われた。参加者は19人。カナダからのJoel Amis、Ĵenja Amis夫妻も出席した。約3時間半、内容豊かなプログラムで楽しい一時を過ごした。また恒例の本の販売も33,560円とますますの売り上げ。ザメンホフ祭終了後、近くのレストラン太陽楼で、Amis夫妻も交えて14人で忘年会を行った。

## 関西大会最新情報

5月31日・6月1日 姫路市国際交流センター「イーグレひめじ」 詳細は1月号の Informilo 参照。

★1月16日、第4回実行委員会を開催し、準備の進捗状況と今後の準備事項等を確認した。出席11人。

★番組の追加

5月31日午後：藤巻謙一さん「エスペラント独習のすすめ」（藤巻さんは「沼津通信講座」講師）

6月1日午前：ミニ大会大学①竹森浩俊さん "Arto pri budhaj statuoj florantaj en Tenpyo-epoko" ②森川和徳さん "Redaktu Wikipedion"（世界大会の Kongresa Universitato のミニ版で、関西大会では2008年以降継続して開講）

6月1日午前：初心者向け①忍岡妙子さん "S-ro Papero"（新聞紙を使った遊び）②外国人と話す会

★一般公開番組

5月31日午後：入門講座（森川和徳さん）

6月1日午後：①講演「柳田国男とエスペラントの人びと」（橋弘文さん）、②野田淳子ミニコンサート、③「現代ポーランドに与えた日本文化の影響」（アレクサンドラ綿貫さん）

★この公開番組を案内するチラシを制作。3月2日姫路市国際交流スプリングフェスティバル等で配布予定。このチラシをご希望の方は KLEG 事務所へ。

★姫路労音で3月16日公演の「上條恒彦 & 野田淳

子コンサート」に向けての事前学習会が1月12日行われ、はりまエスペラント会の中村雅子さんがエスペラントについて約40分説明。また、その出席者約20人がエスペランティスト宝木寛（たからぎ・ゆたか）の生涯をテーマにした野田さん作詞作曲の「時を超えて」を歌った。さらに、労音のコンサートにおいて、大会公開番組案内チラシを配布してもらえることも決まった。

★各種の申し込み締め切り

分科会：3月10日

Gaja Vespero、朗読：4月10日

Bankedo：4月30日

★分科会の会場は余裕がないため、ご希望に添えない場合があります。また、会議室では楽器等を使用できませんので、ご了解ください。

★参加費は、3月1日から4000円に値上り。

★2月5日現在の参加申込みは87人。

★岡山の原田扶佐子さんが指導している山陽女子中学と高校のエスペラント同好会の約10人が参加の予定（5月31日午後）。鳴門からも木谷奉子さん指導の中学生の参加の予定があり、交流番組を企画中。なお、20歳未満は参加無料（大会記念品なし）。

La Movado-La Movado-La Movado-La Movado-La Movado-La Movado-La Movado-La Movado-La Movado-La

### 越年研修会に4カ国から76人

12月30日から1月2日まで、亀岡市の大本本部でエスペラント普及会が主催する越年エスペラント研修会が行われた。参加者は講師や世話人を含めて76人。韓国から7人、ネパールから5人、中国から1人が参加。講習生は7つのクラスに分かれて学習した。中でもユニークな授業内容だったのは、KIM Sun-wook（通称 Suno）さんが指導する初級クラス。講師自身が書いた劇の台本を読み、練習を続けて、実際に全参加者の前でみごとに上演した。

参加者はエスペラントの学習だけではなく、除夜釜、初釜、新年祭など、大本の年末年始諸行事にも参加することができた。

毎回こどもクラスを設けているのもこの研修会の特徴で、今年は5人の小学生がこどもクラスでエ

スペラントを学んだ。

### ロンドの活動

福岡エスペラント会

1月19日にレインボープラザ研修室で一日講習会を行った。講師は武藤たつこさんと橋口成幸さん。冊子「国際語エスペラントへの招待」を用意した。新聞の広報の効果などもあり、受講者は4人。ことばの説明だけではなく、エスペラントを使っている体験談も話した。なお、同会は一日入門講習を毎月企画している。 [←武藤たつこ]

堺エスペラント会・富田林エスペラント会

堺エスペラント会は1月16日に柚のしずく堺東店で総会を開いた。2013年の活動報告・会計報告の中では、2人の新会員を得たことも。新年度役割分担は、代表：寺島俊穂、事務局：蒲池富美子、機

## La Movado-La Movado-La Movado-La Movado-La

関誌編集：横田祐、KLEG 委員：寺本元子。

新年会は同日に富田林エスペラント会と合同で行った。堺から 7 人、富田林から 5 人が参加し歓談、今後も協力して活動することを確認した。

[←寺本元子]

### 宇治城陽エスペラント会

1 月 13 日にパスタの店アグリで新年会を行った。参加者は 10 人。食事と歓談のあと、会の当面の行事について相談した。 [←機関紙 Aromo de Teo]

### 京都エスペラント会

週例会に加えて、月 1 回の中級学習会を日曜日に行う。4 月 13 日、5 月 11 日、6 月 15 日、7 月 13 日、8 月 10 日、9 月 14 日、10 月 19 日、11 月 26 日の予定で、午後 1 時半から京都のエスペラント会館で。会員以外の参加も歓迎（会場費要）。

また、4 月 6 日（日）から週 1 回、全 6 回の入門講座を行う。午前 10 時～12 時、同じ会場で。

### 神戸エスペラント会

3 月 16 日（日）に神戸ハーバーランドスペースシアターで行われる国際交流フェアに初参加する。

## ワン・ワールド・フェスティバルに参加

関西エスペラント連盟は 2 月 1 日・2 日に大阪国際交流センターで行われた「ワン・ワールド・フェスティバル」に参加した。100 団体を超える出品者に混じってブース展示を行い、エスペラントを紹介するチラシ 1000 枚を配布した。

## 「ジャン・有馬の襲撃」京都で上映

エスペラントのせりふが使われている映画『ジャン・有馬の襲撃』（1959 年、モノクロ）が、2 月 22 日（土）午後 6 時から京都市左京区の喫茶店グリーンカナリーで上映される。問合せはエスペラント会館（電話 075-343-3120）へ。

## KLEG（関西連盟）委員会報告

1 月 18 日 15 時 30 分から KLEG 事務所で。出席 20 人、委任 7 人。議長：塚本猛さん（はりま）、書記：木元靖浩さん（奈良）。主な報告審議事項は①第 62 回関西大会 ②第 45 回林間学校 ③第 101 回日本大会 ④ワン・ワールド・フェスティバルへの参加 ⑤各部局からの報告 ⑥各ロンドからの報告

2014.3

# Enigma

## Redakcio

En kongreso prelegis kvin gastoj A, B, C, D kaj E. Ili estas du koreoj, du vjetnamoj kaj unu ĉino. Jen estas tri atestoj:


- 1) A kaj C estas vjetnamoj.
- 2) B estas ĉino dum C estas koreo.
- 3) B estas koreo kaj D estas ĉino.

Du el tiuj atestoj estas veraj kaj unu malvera. Kiu el A ~ E estas ĉino?

Sendu vian solvon al la adreso de redakcio ĝis la 20-a de marto. Se rete, al lamovado@gmail.com.

## Solvo al la januara enigmo:

Jen kiel la plano oni desegnis verdan stelon en kvadrato kun lateroj dek du centimetrojn longaj. Kiom da kvadratcentimetroj havas la areo de la stelo?



Solvo:  $56 \text{ cm}^2$

Kalkulo: la stelo  $ABC\hat{C}DEFG\hat{G}H$  = la kvadrato  $IJDF$  - la trapezoj  $AH\hat{G}I$  kaj  $AJCB$  - la trianguloj  $\hat{G}GF$ ,  $CD\hat{C}$  kaj  $EDF$   
 $= 12 \times 12 - (6+4) \times 4/2 \times 2 - 8 \times 3/2 \times 2 - 12 \times 4/2$   
 $= 144 - 40 - 24 - 24 = 56$

La ĝustan solvon donis 2 legantoj: Kacu, 中村文雄.

Neĝustan solvon donis 1 leganto.

## Mikspoto (当欄は敬称略)

☆ 『週刊読書人』1月17日号に、寺島俊穂による『日本エスペラント運動人名事典』の書評。「社会運動・市民運動の資料として貴重」の見出しでこの事典の全貌を紹介し、さらに、「無名の人々の活動の一端がこうして記録に残るのは類書に例がないことであり」などと、その編集の意図と成果を高く評価。 [←後藤斉]

☆ 『週刊金曜日』1月17日号に、佐高信による『日本エスペラント運動人名事典』の書評。「エスペランティスト2900人『あの人も?』まで網羅する周到さ」の見出しで、桂枝雀、福田赳夫や梶山季之などの「意外な人物まで収録しているところに、この事典の周到さと価値がある」と。 [←田平正子]

☆ 『図書新聞』1月18日号に「日本エスペラント運動の汲めども尽きぬ豊饒な泉がここにある—国家や民族の違いを越えて繋がるエスペランティストの系譜を読む事典」の見出しで、『日本エスペラント運動人名事典』の書評。評者は、ロシア思想研究者の室生孝徳。 [←後藤斉]

☆ 『日本エスペラント運動人名事典』が日本図書

館協会の選定図書に。 [←ひつじ書房]

☆ いささか旧聞になるが、木下長宏『美を生きるための26章 芸術思想史の試み』(みすず書房、2009年)の「ワシリイ・エロシェンコ童話にならない童話のための非擬人法」には、エロシェンコの著作活動に関連してエスペラントへの言及がある。

[←峰芳隆]

☆ 1月27日朝日新聞の広告「MANGAはもう世界の共通語」の中で、藤子不二雄④が「手塚先生は『漫画はエスペラント語だ』とおっしゃいました」と発言している。脚注には「ポーランドの言語学者ザメンホフが、世界共通語とするために19世紀に考案した言語」とある。 [←田平正子]

※編集部注：ザメンホフが言語学者だというのは間違い。

Mikspoto では、原則として活字の形で公表されたものをとりあげています。情報を寄せてくださる方は該当記事のコピーを添えてください。

### 楽しい作文教室 (33) 成績

16名の方から応募がありました。( )内は留意事項です。

うん、良いね：Drako, Eiko, Ĉielo, ヒー坊, ikona, CA, Lv-rivero, Yo, Fumi, Ivajo, M.H.

良いね：T.Ku(綴り), Dalpengji, alfa(綴り), festo(綴り)。

もうひといき：AG(iĝi)。

がんばろう：無し。

#### 楽しい作文教室 5月号課題 (3月20日締切)

①彼は捨てられた子猫を見つけて育てた。

②その子猫は生後2ヶ月くらいだった。

③時々、テレビの上に飛び乗っていた。

④かつての子猫は今19歳である。

(ヒント) 子猫 katido、育てる varti、2ヶ月 du monatoj、テレビ televidilo. forlasi, aĝo, fojo, iam を調べましょう。日本語の原文の内容が、相手にはっきり伝わるように考えて訳してください。

送付先：

[郵送] 〒674-0092 明石市二見町東二見 515-1-811  
塚本 猛

[電子メール] c\_tak@esperanto.ne.jp

(件名に「作文」の文字を入れてください)

添削は受け付けておりませんのでご了承ください。

## KLEG

### 事務局だより

★3月は決算月ですので、個人会費や La Movado 購読料

がまだの方は、よろしくお願ひします。該当者は宛名ラベルに「会費(誌代)切れ。乞う継続」と記載しています。

★3月29日(土)は、10時から棚卸しを行います。お手伝いいただける方は、事前に事務局にご連絡ください。

★本誌をお知り合いの方にお勧めください。見本誌をお送ります。

#### KLEG後援会へのご寄付

(2014年1月、敬称略)

栗城賢輔 10,000円

菊島和子 10,000円





福原英子 5,000円

西千寿子 3,000円

つくいひでき 2,600円

平井優佐子 1,000円

ご支援、ありがとうございます。



◇ 刊行記念特価販売は3月末まで ◇

**日本エスペラント運動人名事典** 特価 5880円  
柴田巖・後藤斉編、峰芳隆監修。エスペラント運動に関わった約2900人の経歴を集成。JEIのご協力ですべて特別価格で販売します(部数限定)。ひつじ書房発行。A5判上製カバー装、函入り、672p。  
※刊行記念特価販売のため会員割引はありません。

**Tagigo(KD)** 2100円  
オペラ歌手藤野祐一が輝かしいバリトンでエスペラント歌曲を歌う(小平圭亮伴奏)。収録曲: La Tagigo、海辺にて、歌の翼に、二人の擲弾兵、グリーン・スリーブズ、ダニー・ボーイ、ハラマ河の谷、ベンバジャの村へ行ったとき、塹壕の中にて、ロモンドの湖、愛して已まじ、砂山、別れの歌、懐かしき緑の星よ。磯部晶策編集、山形エスペラントクラブ発行。

★ 2013年の国内出版物から ★

**簡明エスペラント辞典(第2版)** 1400円  
タニヒロユキ編著。使いやすい!と好評の辞典の第2版。一般的な文はほぼこの辞書で読めます。

**Kuru, Melos!** 350円  
小西岳訳、太宰治「走れメロス」。原作テキスト付き。挿絵: 西田周司(新制作協会会員)。

**対訳宮沢賢治童話集(第2版)** 1200円  
小西岳訳。「気の良い火山弾」「蛙のゴム靴」「ひのきとひなげし」「蜘蛛となめくじと狸」。

**稲むらの火 浜口梧陵のはなし** 800円  
松下千恵作、藤井博之挿絵、江川治邦訳。わかや

ま絵本の会、英語グループとの連携で出版。

**Japana Literatura Juvelaro** 1050円  
第100回日本大会記念に出版された日本文学集。古代から近代まで多彩な作品を収録。

**Raportoj el Japanio 16** 1300円  
堀泰雄による日本の「いま」を世界へ伝えるレポート集最新刊。2012年3月以降の被災地を活写。

**世界の旅人堀さんの気ままエッセー3** 1200円  
愛読者の多い堀泰雄の好評エッセー集第3巻。東日本大震災被災地の訪問記などを収録。

**作文のためのエスペラント類義語集(増補版)** 840円  
阪直著。2000年発行の初版を大幅に増補。豊富な用例で表現の幅が広がる。索引付き。

**日本語エスペラント辞典・DVD版** 1050円  
宮本正男編『日本語エスペラント辞典』の電子版(DVD制作福本博次)。

**ドリル式エスペラント入門 その1・その2** 840円  
JEI新教材企画委員会作成の自習教材。その1が43課、その2が40課。解答集は別冊(210円)。

ご注文は郵便、ファクス、電子メールで。送料は実費。現品と一緒に請求書を送ります。支払いは振替口座で。

## 編集ノート



☆ 11ページの楽譜は、金子みすゞの詩にシンガーソングライター野田淳子さんが曲をつけたものです。野田さんは京都エスペラント会の会員です。(島谷剛)

発行所: ラ・モバード社 編集: 小西岳 発行人: 北さと 定価280円 送料60円 1年3800円 送料共本局: 一般社団法人 関西エスペラント連盟内 561-0802 豊中市曾根東町1-11-46-204  
電話 (06) 6841-1928 ファクス専用 (06) 6841-1955 電子メール: esperanto@kleg.jp  
振替口座 00960-1-60436 「一般社団法人 関西エスペラント連盟」 ホームページ: http://kleg.jp  
九州支局: 九州エスペラント連盟内 818-0105 福岡県太宰府市都府楼南2-8-7 武藤たつこ方 電話 (092) 923-2877  
中国四国支局: 中国四国エスペラント連盟内 734-0041 広島市南区黄金山町7-15 忍岡守隆方 電話 (082) 286-2745  
印刷人: 村上治道 621-0815 京都府亀岡市古世町北古世82-3 株式会社 天声社